

« La serpento el ŝtono »

De antaŭ pluraj semajnoj, la loĝantoj de la vilaĝo Bouresse ne povis viziti siajn mortintojn ; ĉar en la granda aleo de la tombejo, inter la maljunaj cedroj, grandega serpento kuŝis volviĝinta, fikse rigardanta tiujn, kiuj alproksimiĝis al la pordo. Kaj, kvankam estis en Bouresse pli ol unu kuraĝulo, neniu jam povis elteni tiun rigardon, en ties fundo, laŭdire, flagris la rebrilo de la inferaj flamoj. Tamen la mortintoj restis forlasitaj, la musko kovris la malnovajn ŝtonojn, kaj la krucoj de la tomboj malaperis en la bukstufoj.

Antaŭ preskaŭ jarcento tio okazis : la pastro de Bouresse tiam estis sankta viro, klerulo, scianta muzikon, skulpturon kaj multajn aliajn aferojn. Kiam la demono enŝoviĝis en la korpojn de homoj aŭ bestoj, li elpelis ĝin. Tial, kiam li venis por liberigi la tombejon, li eltenis la rigardon de la monstro, sed kiam li alproksimiĝis apud ĝi, la serpento parolis ; « Pastro, vi ne havas povon super mi, ĉar vi estas pekanto : memoru la vinberojn, kiujn vi ŝtelis ! - jes, ekkriis la pastro, mi malpravus pro mia pluko de tiuj fruktoj ; sed mi anstataŭigis ilin per argenta monero.

Sinjoro juĝu min, kaj al vi, Demono, mi ordonas je lia nomo forlasi tiun sanktan lokon. » Je tiuj paroloj, la serpento konfuzita forfuĝis disvolvante korpon tiom granda, ke la aleo apenaŭ povis enteni ĝin.

Sed post la foriro de la sankta homo, ĝi revenis en sian kutiman lokon, kaj longatempe same estis, malaperanta, kiam la pastro alproksimiĝis, la demono montriĝis tuj kiam li ne plu ĉeestis.

La plej aŭdacaj ĉasistoj vane provis trafi ĝin ; ilia mano tremis fronte al ĝia rigardo, la benitaj kugloj devojiĝis en la herbojn. La pastro kaj liaj parokanoj estis plenaj de malĝojo , ĉar ili konstatis, ke Dio ne plu estis kun ili.

Post multe preĝi, la sacerdoto mem decidis pentofari per peniga faritaĵo pro la pekoj de siaj fideluloj. Kaj dum longatempe oni vidis lin transporti en la tombejon ŝtonojn kaj marmorojn, ilojn kaj iomete da nutraĵo. Poste li restis dum semajnoj sen forlasi la loĝejon de la mortintoj : preĝanta, laboranta, manĝanta kaj apenaŭ dormanta, iranta por haste celebri sian meson antaŭ la aŭroro, li starigis, sur ronda teraso cirkaŭata de ŝtupoj el granito, alian krucon sur kiu volviĝis grandega serpento el ŝtono. Kiam lia verko estis finita, li benis ĝin kaj ekkriis : « neniam la ĉeesto de la Demono makulos tiujn lokojn ».

La morgaŭon ĉiuj loĝantoj de Bouresse venis preĝi ĉe la tomboj ; sed elĉerpita la maljuna pastro baldaŭ mortis. Lia tombo-monumento, kiun li mem skulptis, estas la plej proksima de la ŝtona serpento. Dum la memoriga tago de la mortintoj la kultivistoj iras tien por preĝi pri lia animo, dum la procesio, paŝanta malrapide sub la cedroj, haltas piede de la kruco.

Moŝto Pastro Gaillard

